

Printempaj promenoj en Kvinpetalo

kvinpetalo



Printempo revenis en la norda hemisfero, eĉ kun somerecaj tagoj en iuj lokoj.

Kial ne veni al Bouresse, por ĝui la trankvilon de la kamparo ?
La kulturcentro Kvinpetalo proponas plurajn renkontiĝojn :

Aprilo 09a-10a	Praktika staĝo pri ekologia ĝardenumado Ankaŭ nelingve spertaj homoj bonvenas	Bernard Lagrange
Aprilo 11a	Ĝenerala asembleo de SYM je la 10a	
Aprilo 20a-24a	Promenado tra la esperanta literaturo	Anne Jausions
Majo 13a-16a	Vigligo de regiona Esperanto-agado	konfirmota gvidanto
Aŭgusto 10a-17a	Muzika Staĝo - Kantoj, Ĥoroj, Orkestra muziko - Realigo de KD	Markov-familianoj
Aprilo 09a-10a	Praktika staĝo pri ekologia ĝardenumado	Bernard Lagrange

Revo de multaj : ekologie ĝardenumi.

Spertulo pri la temo Bernard Lagrange klerigos vin kiel ĝardenumi respektante la medion kaj la naturajn ekvilibrojn, kaj vi havos okazon tuj praktiki, tiel kontribuante al la plibeligo de la ĝardenaj partoj de Kvinpetalo. Ankaŭ nelingve spertaj homoj kaj ĝardenumaj komencantoj bonvenas.

Aprilo 20a-24a **Promenado tra la esperanta literaturo** Anne Jausions

Anne Jausions estas diplomita pri Interlingvistikaj Studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz, en Poznan. Ŝi proponas al vi **promenadon tra la originala Esperanto-literaturo** :

« Mi parolos pri kelkaj klasikuloj, kaj pri nuntempuloj, kiujn mi ŝatas. Vi ricevos eltiraĵojn el romanoj, noveloj kaj poeziaĵoj (ne temos pri teatraĵoj). Temos ĉefe pri eŭropaj verkistoj, kaj mi diros nur kelkajn vortojn pri azianoj. »

Partoprenontoj, kiuj havas emon pri tio, estas invitataj fari kelkminutan intervenon por prezenti libron, kiun ili ŝatas.

La kurso estos okazo por viziti la riĉan bibliotekon de Kvinpetalo, kaj trafoliumi diversajn librojn.

Informoj pri Kvinpetalo ĉe <http://kvinpetalo.org>
Aliĝoj ĉe informoj@kvinpetalo.org

Centre espéranto Kvinpetalo, 15 rue du lavoir, 86410 Bouresse

Informoj pri la tujaj staĝoj : mesaĝu al moonmont@pt.lu aŭ telefonu al : (+) 33 (0) 607 316 781